

le monde de l'ESPÉRANTO

numéro
588

15 septembre 2014



DOSSIER



- L'actualité de l'espéranto
- La vie de l'association
- Culture et voyages

L'espéranto dans les écoles

PAGE 6

ACTUALITÉS

Remise de la pétition au Ministère de l'Éducation Nationale

PAGE 4

espéranto
France

4,50 €

éditorial • frontartikolo

Forums associatifs, Journée européenne des Langues, intervention dans les écoles dans le cadre de l'aménagement des rythmes scolaires, ne ratez pas les bonnes occasions de la rentrée! L'espéranto à l'école, c'est maintenant et le dossier de ce numéro est consacré au séminaire animé par Katalin Kováts pour former des enseignants.



Comme à toutes les rentrées, de bonnes résolutions. Suivre un cours de perfectionnement, lire un peu de littérature, participer à des stages... et s'investir dans le grand chantier de l'année, le Mondial d'Espéranto à Lille fin juillet 2015!

L'équipe de pilotage de ce centième congrès a réparti le travail en équipes sur les axes suivants: coordination et administration, programme, logistique, communication. Tout le monde se prépare au grand événement. Les artistes mettent au point leurs spectacles. Les futurs guides, qui ont suivi le stage de formation, rodent leurs excursions. L'équipe « Bienvenue » réfléchit à la manière optimale d'accueillir les congressistes, que nous espérons très nombreux. L'équipe communication a produit le document de présentation ci-joint.

Parlez du Mondial autour de vous, à vos amis du monde entier, il n'est pas trop tôt! Et vous?

Pensez à ce que vous pourriez faire pour aider...

Pour un sans faute en juillet 2015!

Claude Nourmont, rédacteur en chef

A sociaj forumoj, Eŭropa Tago de la Lingvoj, interveno en la lernejoj kadre de la reorganizo de la lerneja tempo, ne maltrafu la bonajn okazojn de la postferia tempo! Estas la ĝusta momento por enkonduki Esperanton en la lernejoj kaj la dosiero de tiu ĉi numero estas dediĉita al la seminario gvidita de Katalin Kováts por trejnadado de instruistoj.

Kiel ĉiu-jare en tiu periodo, bonaj decidoj. Sekvi perfektigan kurson, legi iom da literaturo, partopreni staĝojn... kaj engaĝi sin en la granda entrepreno de la jaro: la Universala Kongreso en Lillo fine de julio 2015!

La gvida teamo de tiu 100^e kongreso dividis la taskojn inter pluraj teamoj, laŭ la jenaj aksoj: kunordigo kaj administrado, programo, logistiko, komunikado. Ĉiuj pretigas sin por la granda evento. La artistoj elaboras siajn spektaklojn. La estontaj ĉiĉeronoj, kiuj sekvis preparan staĝon, provas siajn ekskursojn. La bonveniga teamo pripensas la plej bonan manieron akcepti la espereble multnombrajn kongresanojn. La komunika teamo produktis la Unuan Bultenon, kiun vi trovos ĉi-kune.

Parolu pri la Universala Kongreso al viaj proksimaj kaj malproksimaj konatuloj en la tuta mondo, ne estas tro frue!

Kaj vi? Kiel vi povus helpi?

Ek al perfekta kongreso en julio 2015!

Claude Nourmont, ĉefredaktoro

ACTUALITES

► L'espéranto a sa télévision p.5

DOSSIER

► L'espéranto dans les écoles p.6

ASOCIA VIVO

► Nia kongreso en Chambéry p.12

CULTURE

► Arkivo de Scienca Revuo p.15

VOYAGE

► Tooni post la cunamo p.17

Revue d'espéranto fondée en 1908, éditée par Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, F-75004 Paris

Tél. 09 51 77 18 33 - www.esperanto-france.org

Tout (sauf réd.): info@esperanto-france.org

Trimestriel : 4 n° par an - Dépôt légal à parution

Tous droits de reproduction réservés

Les opinions exprimées n'engagent que leurs auteurs et ne représentent pas nécessairement celles de l'association ou de la rédaction.

Directeur de publication : A. Rousseau

Rédacteur en chef : Claude Nourmont

mondo@esperanto-france.org

Envoi des articles 1 mois avant parution

Ont aussi participé ou contribué à ce numéro : F. Bartsch, J.P. Boulet, B. Flochon, HORI Jasuo, A. Jausions, K. Kováts, D. Loison, D. Mackenzie Peers, Melono, B. Moon, Y. Nicolas, L. Patas d'Illiers, V. Poór, Ret-info, R. Triolle, M. van der Kooij

Crédits photographiques :

Alternatiba, B. Flochon, B. Moon.

Publicité/annonces : à la rédaction

Abonnement : 1 an (4 n°) : 18€ à

Espéranto-France

Impression : IPPAC, Langres (52),

membre de Imprim'vert

Imprimé en septembre 2014

Mise en page : Bruno Flochon

ISSN 1628-1942 - Commission paritaire : en cours

Ce dessin est reconnaissable par certains téléphones mobiles et permet de se connecter au site internet indiqué par le code.

Le code ci-dessous indique le site d'Espéranto-France.



Les colonnes de la Paix à Samarkand



Lors de la Journée Internationale des Musées, les « faiseurs de paix » du Japon ont planté à Samarkand (Ouzbékistan) trois colonnes avec l'inscription *Dunyoda tinchlik bo'lsin* (Paco regu sur la Tero) en ouzbek, japonais, anglais et espéranto. Les colonnes doivent rappeler aux visiteurs des sites classés par l'UNESCO « Patrimoine de l'humanité » les valeurs de paix, tolérance et harmonie.

en bref • mallonge

● CONGRÈS MONDIAL 2015 À LILLE

Le thème officiel du congrès sera « langues, arts et valeurs dans le dialogue inter-culturel ».

Visitez le site dédié, en espéranto à l'adresse www.lille2015.fr et en français à www.lille2015.fr/fr.



● WIKIPEDIA

Le 14 août dernier est paru le 200 000^e article en espéranto sur Wikipedia ! Est-ce grâce aux participants au stage « Promenade dans la nature et Wikipedia » à Kvinpetalo qui s'est déroulé du 11 au 15 août ? La météo n'étant pas toujours au beau fixe, Alain Favre, spécialiste en botanique, et les stagiaires ont consacré beaucoup de temps (même jusqu'à une heure tardive) à rédiger, comparer, modifier des articles pour Wikipedia sur différentes espèces botaniques.

Remise de la pétition au Ministère de l'Éducation Nationale

La pétition pour l'ajout de l'espéranto comme option au bac, signée par 34 881 personnes dont de nombreux élus locaux ou nationaux, a été remise le vendredi 21 mars 2014 au Ministère de l'éducation nationale par une délégation de 5 personnes : Mrs Emmanuel Debanne, coordinateur de la campagne "l'Espéranto au bac", Guy Cavalier, président de SAT-Amikaro et Axel Rousseau, président d'Espéranto-France, François Lo Jacomo, membre de l'Académie d'Espéranto et examinateur d'espéranto, Dorian Reale-Caron, lycéen de seconde.

La délégation a été très bien reçue et l'entretien a duré plus d'une heure. Notre interlocutrice, cheffe de bureau des lycées d'enseignement général et technologique nous a dit qu'elle avait reçu il y a quelques jours une délégation kurde demandant que le kurde soit admis au baccalauréat et qu'ajouter une langue n'est pas si simple car l'Inspection Générale doit s'adjoindre un responsable de ladite langue qui valide les épreuves. Elle fera son rapport, mais le Ministère est préoccupé par la réforme des lycées et ne pourra rien décider



sur notre demande dans les prochaines semaines. Nous lui avons offert, outre le dossier de la pétition, les deux DVD sur l'espéranto ainsi que d'autres ouvrages.

L'espéranto a sa télévision



Http://esperantotv.net il suffit de taper ces quelques caractères et votre ordinateur devient un téléviseur, émettant en continu... et en espéranto !

La malédiction qui frappait la télévision en espéranto serait-elle conjurée ? Certains se souviennent de la première télévision émettant en espéranto, Internacia Televido, qui a émis de novembre 2005 à août 2006 au Brésil, avant de cesser définitivement. Internacia Televido devait fonctionner par abonnement mais elle n'a pas pu trouver les ressources financières suffisantes pour assurer sa survie. Pour beaucoup, cette expérience malheureuse était la preuve qu'il était impossible de faire vivre une télévision émettant en espéranto, une chaîne de télévision coûtant bien plus cher qu'une radio.

Et pourtant, ils l'ont fait ! Trois jeunes australiens de Sydney, Dimitri Lushnikov, Richard Delamore et Marina Lobanova, ont créé le 5 avril 2014 une chaîne de télévision en ligne. EsperantoTV fait partie du bouquet de chaînes de télévision proposé par iStreamStudios. Elle dispose de son propre studio de tournage.

EsperantoTV émet exclusivement en espéranto. Elle présente soit des vidéos tournées par l'équipe de la chaîne, soit des vidéos transmises par des espérantistes du monde entier. Et les sujets sont variés : interviews, reportages, leçons d'espéranto, dessins animés de style japonais, recettes de cuisine filmées,

démonstrations de bricolage etc. Leur collection de vidéos est aussi accessible directement, par l'adresse <http://www.istreamstudios.tv/index.php/channel/30/esperanto/> Les vidéos sont classées par date, par popularité et par nuage de mots-clés.

Vous pouvez les aider à faire vivre leur projet. Rejoignez-les sur leur page Facebook <https://www.facebook.com/LaEsperantoTV> Transmettez-leur les vidéos que vous avez réalisées et aidez-les à traduire des vidéos. Pour le moment, l'équilibre financier est assuré : la chaîne est soutenue par un mécène, l'équipe est bénévole et vous pouvez leur envoyer des dons.

EsperantoTV est une belle aventure et nous lui souhaitons bonne chance et longue vie !

Ecran d'accueil d'EsperantoTV. Pour regarder la télévision en plein écran, cliquez sur l'icône « plein écran » en bas à droite de la vidéo.

Laure



Vizitu vian propran domon ĉe
Nieuwe Binnenweg 176 en Roterdamo dum

MALFERMA TAGO

sabaton la 29-an de novembro 2014 (10h00 - 17h00)



Prelegoj de
László Szilvási
Toon Witkam
Barbara Pietrzak

- ★ En la libroservo ĉio kun sesona rabato
- ★ Specialaj ofertoj
- ★ Bazaro de esperantaĵoj
- ★ Senpaga loterio
- ★ Kafo kaj teo senpagaj

Bonvenon!



L'ESPÉRANTO DANS LES ÉCOLES

Metodika staĝo en Kvinpetalo

Inter la 14a kaj 18a de aprilo mi, Katalin Kováts, redaktoro de www.edukado.net gvidis metodikan seminarion en Kvinpetalo, Francio.

En la 90^{aj} jaroj mi plurfoje kursumis en Bouresse; miaj pli aĝaj gefiloj Bence kaj Petra tie pasigis siajn somerajn feriojn, estis unufoje en esperantista medio, eksentis kaj ekemis paroli, lerni la internacian lingvon. Poste ankaŭ mia alia filo estis kun mi tie antaŭ 10 jaroj. Do, reiri al Bouresse, estis ankaŭ vojaĝo al la pasinteco.

La mastrumado de la centro estas nun en la manoj de la geedzoj Brian Moon – mia kolego el la akademio kaj Claude

Nourmont (ne nia Claude L.) – eks-estraranino de UEA, kiujn mi nun ekkonis en iliaj aliaj flankoj, nome en tiu de gastigantoj, manĝigantoj, veturigantoj, organizantoj. Estis interesa sperto.

Je granda ĝojo al la intensa semajno aliĝis entute 12 plentempaj kaj 3 parttempaj kursanoj, ĉefe francoj, sed ankaŭ svisino, kataluno, usonano el Berlino kaj kubano. ni havis junajn partoprenantojn kaj ankaŭ iom pli aĝajn, sed anime tamen junajn !

Kvinpetalon mi trovis iom pli granda ol kian mi konis el la malnova tempo. Al la malnova kvin-konstruaĵa komplekso aldoniĝis nova domo kun novaj ejoj, kie ni nun ĉefe manĝis, sociumis kaj povis RETUMI (!!!), se iu hazarde ne ĝuste tiam rompis la konekton pro simpla telefonvoko aŭ stumblis en la kablo. Por aliaj celoj ni uzis la malnovajn domojn. La kursejo bedaŭrinde nek grandiĝis, nek heliĝis en la lastaj dek

jaroj, kion akcepti iom malfacilis en la komenco, sed danke al nia entuziasmo kaj aktiveco, daŭra ŝanĝo de planoj, de agadlokoj kaj teknikaĵoj, ni venkis la malfacilaĵojn kaj lernis navigi nin en la plenŝtopita ĉambro. Ni sukcesis ensorĉi eĉ lumon kaj varmon en la ejo.

Kiel sperta kaj duboplena kursgvidanto, mi kunportis preskaŭ ĉiujn necesajn ilojn, projekciilon, printilon, librojn ktp. Do, tiuflanke ni estis bone ekipitaj. Krom la lerto, ke en momentoj, kiam mi ne rimarkis la tempopason, mia komputilo simple malfunkciis, ĉu pro troa ŝarĝo de la elektrosistemo, aŭ sukcesa kaŝa interveno de Chuck. Nu, ĉiuj ĝojis



En préparation, les prochains dossiers

LME 589 : Rolo de Esperanto en la unua mondmilito

LME 590 : Les congrès mondiaux

Envoyez vos contributions à mondo@esperanto-france.org

pro eta teknika paŭzeto.

La manko de la reto en la klasĉambro estis problemo, sed ni kelkfoje invadis la manĝejon kaj tie kursumis. En kelkaj postagmezoj ni instalas nin eĉ en la ĝardeno kaj ŝajne ripozante, ni tamen diligente laboris, allogante ankaŭ nekursanojn kaj la hundon de Pierre.

La tagoj estis plenplenaj. Seminario inter la 9a kaj 12.30 (oficiale, sed pli longa reale) kaj post longa franca manĝado kaj purigado, fakte senripoze ni denove plonĝis en la laboron je la 15a horo ĝis la 19a. Postvespermanĝe ni

pro iliaj kontribuajtoj.

- Uzo de modernaj teknikiloj kaj de la reto por instruado de Esperanto (Kompreneble prezento de www.edukado.net)

- Modernaj kaj efikaj lernolibroj, instrumaterialoj (vivproksime kun multaj libroj, materialoj, ekzercoj... en kvanto de la kofrujo de mia aŭto.)

- Planado de semajnfinaĵoj kaj longperiodaj kursoj (teorio, konsiloj, ekzemploj, praktiko. ni ofte menciis la laboron de Béatrice Allée, Anna Lowenstein kaj Arlette Plutniak valorigante iliajn mate-

rialojn kaj seriojn ĉe edukado.net. Dankon al ili.)

- Evoluigo de lingvaj kapabloj kun taŭgaj ekzercoj kaj materialoj (ni havis eĉ tempon elprovi kelkajn ekzercojn, inter ili rekonon kaj 'vendadon' de la strangaj objektoj de Sylvain aŭ rolludon pri la



ĉiam havis iun programon, ekz. prelegon pri Kubo, prezenton de retaj ludoj de Chuck Smith, ktp. En la naskiĝdatreveno de RISKO ni okazigis vivan, ĉeestan ludon, en kiu venkis Sylvie.

En la programo ni traktis la sekvajn temojn (la listigo suba estas sen vera kronologia vicordo aŭ graveco) :


- Historio kaj metodoj de lingvoinstruado, kun aparta atento pri la nuntempe efike uzeblejaj

elementoj. La aplikata hungara kiel ŝoklingvo vere efikis. ni spektis, analizis ankaŭ kelkajn filmojn, fragmentojn el lecionoj, ekz. de Stano Marček.

- Varbado, informado. Kiel kompili informprelegon kaj mallongan publikan prezenton de Esperanto (tekniko, enhavo, prezentmaniero). ni spektis filmitajn erojn de mia kurso, gvidita en Vieno, dum la muzeaj noktoj. <http://www.ipernity.com/blog/edukado.net/98314>. Ankaŭ la kursanoj montris al ni siajn ideojn. Dankon al Sylvie, Jean-François kaj Claude, plie al Chuck kaj Mélanie



hotel. La iom 'palan' prezenton de la ĉeesta teatrotrupo vigligis la posta spektado de la samtema prezento de la seminarianoj en Ĉinio, en la Hotelo de Esperanto-Insulo. <https://www.youtube.com/watch?v=aHRFr4pgHJo>. Konkludo: por efike bone ludi, oni devas havi fortajn impulsojn...



Por ludo pri plendado, Hajnano venkis Kvinpetalon.

- Mi mem prezentis kelkajn trukojn kaj teknikojn por instruado de tiklaj temoj, gramatikaĵoj, kiel ekz. akuzativo, akuzativo de direkto, refleksivo, korelativa danco... Danke al tiuj prezentoj la kursanoj fariĝis ne nur pli spertaj, sed kelkaj ankaŭ pli belaj.

- Tipaj lingvaj eraroj de francoj kaj alinaciuloj kun diskutoj pri gramatikaĵoj kaj leksiko (ekzemple: kvinoo). Mi ekaplikis tuj la akuzativan dancon (fortan piedbatadon de la planko ĉe manko de akuzativo)... kaj la teknikon ni daŭre aplikis por turmenti unu la aliajn. Ni profitis dum la manĝoj la ĉeeston de Brian Moon, vicprezidanto de la Akademio, kiun ni ofte konfrontigis kun gramatikaj problemoj. (Tial daŭris la manĝoj du horojn). Estis bone, ke preskaŭ ĉiam li kaj mi mem, la du akademianoj, havis la saman opinion (mi celas gramatikon), kio tamen ne estas tipa situacio ene de la Akademio.





- Psikologiaj faktoroj de lernado, efika prezento (Atento, memoro, forgeso, ripeto, ktp).
- Prezento de propraj instruhelpiloj. Mian kolekton eble eĉ superis tiu de



Pierre, la Unua (ni havis du), kiu venis per plena aŭto de tre interesaj propraj materialoj. Ni estis ĉiuj ravitaj.

- Prezento de konkreta instrusituacio, baze de la materialo Pasporto al la tuta mondo (instruis nin Chuck kaj Mélanie, dankon.)
- Okazis ankaŭ spertinterŝanĝoj: a. Viktoro instruis al ni kiel uzi muzikajn gestojn por konsciigi pri gramatiko.



b. Sylvie montris komputilprogramon noteWorthy Composer por komponi muzikon aŭ reskribi muziknotojn kaj aldoni tekstojn.

c. Chuck ravis nin per komputilaj kaj saĝtelefonaj ludiloj, inter ili per sia ĵus oficiale akceptita

ludilo. Oni festis tion.

d. Claude L. prezentis sian laboron en kadro de eksterlernaj programoj, kie li instruas Esperanton.

e. Pierre L. Informis pri sia laboro por Esperanto etape: <http://edukado.net/biblioteko/filmejo?iid=232>

London, la unuan tagon de la seminario, ni havis du plentagajn gastojn, Pjeron kaj Christian el Limoĝo, kiuj kunportis bongustajn manĝaĵojn kaj espereble kunportis hejmen utilajn spertojn.

- Ni havis ankaŭ libroservan vesperon kaj kelkaj libroj de tie kaj el mia kofro trovis novajn posedantojn.

- Por zorgi pri la envilaĝa informado, lasttage ni manĝis en la loka restoracio kaj vizitis la mediatekon, kie ni trovis

librobreton kun kelkaj Esperanto-libroj.

- Krom la vizito de la limoĝanoj vizitis nin ankaŭ ĵurnalisto kaj aperis raporto pri nia kurso en la loka ĵurnalo <http://esperanto-france.org/articles-publies-dans-la-presse-en-2014>


(28/04)

- Mi lasttage vizitis ankaŭ Suzanne Bourot, kiu loĝas samterene kaj en 1985 fondis kaj poste gvidis kun Georges Lagrange la kulturcentron dum 20 jaroj. Dum la interparolo kun ŝi kaj rigardado de la malnovaj albumoj de la centro leviĝis belaj memoraĵoj.

Ni volis ankoraŭ kanti, muziki, sed la gitaro kiun Sylvie el Liono portis kun si estis la sola kiu feris, pro tempomankego. Ni simple ne havis pli da momentoj enŝovi ion ajn en la 5-tagan kursprogramon.

Jes, 5 tagoj sufiĉis. La cerboj ne plu kapablis ensorbi pli da informoj kaj akuzativoj.

La hejma tasko estis ankoraŭ dokumenti la kurson, raporti, kolekti fotojn, preni kontakton kun ĉiuj kaj krei por



ili surfacon en la KLERIGEJO, kien mi alŝutis materialojn, ligojn por ke la partoprenintoj retrovu ĉion, pri kio ni okupiĝis.


Katalin Kováts

www.edukado.net
redaktanto@edukado.net
Pliajn fotojn vidu ĉe <http://www.edukado.net/biblioteko/fotoj?al=53>



kompleta raporto: http://www.kvinpetalo.org/IMG/pdf/metodika_stagxo_en_kvinpatalo.pdf

Fotoj de Brian, Katalin, Nicole, Miguel kaj Viktoro.



Enseigner l'espéranto

«Instruisto post unu tago» comme le dit Jomo (enseignant après une seule journée de cours).

Le plaisir que l'on peut trouver à l'apprentissage de l'Espéranto donne envie de le partager, d'en faire profiter les autres, de leur enseigner la langue.

Mais cela ne s'improvise pas, au risque de décourager les apprentis espérantistes.

Tel était le thème du stage que Katalin Kovats a donné au centre espéranto Kvinpetalo, du 10 au 14 avril, à 14 stagiaires motivés.

Les méthodes d'enseignement sont multiples et variées et ont évolué au fil des ans. Les plus anciennes favorisaient la grammaire et la traduction. Jan Komensky introduisit l'utilisation des images. Puis vinrent les méthodes directes qui privilégient la parole et ce sans utiliser la langue maternelle des élèves. Les années 70 virent fleurir les méthodes, de la «voie silencieuse», où l'enseignant ne prononçait pas un seul

mot, au «centre de communication» utilisant le dialogue, les jeux de rôle, l'improvisation, en passant par la «réponse physique totale» basée sur les gestes.

Vient ensuite le choix du matériel. Livres, DVD, sites internet, là aussi l'offre est vaste. Un manuel brésilien «Esperanto por lernejoj klasoj» a obtenu la première place, suivi par «La krimo de Katrina». Le DVD «Pasporto al la tuta mondo» raconte l'histoire d'un berger espérantiste hébergé par une famille également espérantiste et complètement loufoque (le père est philosophe, la mère danseuse de ballet et la fille juge). Le tout servi par des comédiens internationaux à la prononciation parfaite. De nombreux thèmes sont abordés dans «Temagemo» pour les élèves plus avancés. Sans oublier les sites internet qui proposent des cours, comme «lernu» et «ikurso».

Pour ne pas s'emmêler les pinceaux, il est conseillé de planifier ses cours pour l'année, en détaillant le déroulement

des leçons, sans oublier les exercices.

Pour enseigner de façon efficace il est bon de connaître quelques chiffres. Des cinq sens le plus utilisé est celui de la vue à 70%, puis l'audition à 20%. L'attention baisse au bout de seulement 10 min., il faut donc varier les approches au cours d'une même leçon. La meilleure façon de retenir ce que l'on apprend est de l'enseigner aux autres, la pire est d'écouter une conférence.

L'information que l'on veut transmettre devrait être simple, concrète, inattendue, plausible, faire appel aux émotions, faire partie d'un récit. Il est bon de varier les outils, livres, images, jeux, objets, internet, sketches, théâtre, films courts, skype, quiz, enregistreur, jeux de rôle etc.

Pour éviter la routine qui peut mener à l'ennui et maintenir l'intérêt et l'envie d'apprendre, il faut étonner, solliciter, faire appel à l'imagination, au rêve.

Dinah

UK 2015 en Francio

Prepare al la UK Lillo...

En Kvinpetalo, de la 10^a ĝis la 15^a de junio okazis staĝo celanta klerigon de la gvidantoj-ĉiĉeronoj por la Universala Kongreso en Lillo en 2015.

Dum UK oni nepre celu havi interesajn kaj altkvalitajn ekskursojn, kun ĉiĉeronado en Esperanto, laŭeble sen tradukado.

En Francio ni bonŝancas ke estas du profesiaj esperantistaj ĉiĉeronoj, kiuj povos mem ĉiĉeroni dum ekskursoj kaj kiuj povis gvidi la staĝon. Catherine Kremer, arthistoriisto kaj profesia ĉiĉerono kun diversa sperto kaj klerigado, gvidas turismajn semajnojn en Esperanto. Anne Amblès estas trejnisto kaj pri team-kunlaborado kaj grup-vivigo, estis profesia internacia ĉiĉerono dum 15 jaroj, aktivadas pri justa turismo.

« Ni celas altan kvaliton por la ekskursoj, skribis Anne kaj tio implicas multajn kompetentojn. Ĉiu trejnato plibonigos kaj plidiversigos siajn, laŭ persona skemo, laŭ sia aktuala nivelo en ĉiu el ili.

Alta kvalito ne signifas elitajn kulturajn nivelojn, sed kunigon de la necesaj ecoj por plej kontentigi la ekskursantojn kaj plej efike vekii ilian intereson, komprenemon, observemon kaj entuziasmon. Tiel ke ili memoru la ekskurson kiel tute indan travivaĵon. »

Realaj kondiĉoj, kiuj ankaŭ povus trafi iujn ekskursojn...

La 13 staĝantoj, kiuj venis el 3 landoj kaj pluraj regionoj de Francio, ne nur el la Nordo, parte alvenis jam la antaŭan tagon, sed pluraj havis problemojn por alveni ĝustatempe. Okazis grandaj ŝtormoj kaj iuj rapidtraĵoj ne povis funkcii. Realaj kondiĉoj, kiuj ankaŭ

povus trafi iujn ekskursojn... La fino de la staĝo devis esti parte malprokrastita

pro ĉi foje striko de la fervojistoj. Lokaj trajnoj kiel tiu de Lussac al Poitiers tute ne funkciis, rapidtraĵoj tre aleatore funkciis...

Kion oni traktis dum 5 tagoj da intensa laboro ?

- eroj kaj ecoj de ideala ekskurso (laŭ la diversaj tipoj de ekskurso-celoj, laŭ la veturado / biciklado / piedirado...)

- preparad-teknikoj

- divers-fakeco, trans-fakeco (de socipolitiko tra popolkulturo ĝis arkeologio)

- ekvibrado de la informoj...

- adapto al la kultura diverseco de la kongresanoj: humuro povas esti mise aŭ tute ne komprenata, diversaj gestoj aŭ sintenoj havas malsaman signifon laŭ la kulturoj

- grup-mastrumado

- problemoj: kion fari se mankas partoprenanto? Okaze de akcidento?

- rilatado kun ŝoforo kaj aliaj kunlaborantoj (restoracio...)

- publika parolado: gravas tre klare prononci (prefere en mikrofono).

« Lillo estas laŭ loĝantaro la kvara plej granda aglomeraĵo de Francio, post Parizo, Liono kaj Marsejlo. » Jen komenca klariga frazo, kiun oni klopodu diri tre klare, laŭte, rigardante la publikon.

- tempo-mastrumado : neceso bone plani la ekskurson, la paŭzojn; la programo ne estu tro plena ;

- rolo, sinteno kaj etiko de UK-ĉiĉerono.

Estis kelkaj rol-ludoj, kie ekz. la ĉiĉerono akceptis la partoprenantojn en la buson, ekklarigis la celon de la ekskurso, klopodis trankviligi malfacilan partoprenanton, diskutis kun la ŝoforo pri neces(ej)a halto...



100^a Universala Kongreso de Esperanto
Lillo, 25 julio-1 aŭgusto 2015

Kiel surloka ekzemplo Brian Moon vizitigis la vilaĝon Bouresse. Alian tagon pluraj partoprenantoj faris ĉiĉeronan ekzercon pri la fasado kaj la interna parto de la kirko.

La partoprenintoj disdividis inter si la taskojn por la sekvaj semajnoj. Katja Boen kaj Philippe Pellicier preparos resumon de la staĝo.

Komuna baza dokumentaro pri urba kaj regiona historio, geografio, lingvo, arkitekturo kaj aliaj artoj

Pri teknikaj (informadikaj) aferoj, Denis Jeanteur kaj Philippe prizorgos (kun helpo de Aleks Kadar). Anne pretigos ŝablonon por komuna manlibro « Kiel gvidi ekskurson ». Tuta listo da tekstoj estas verkendaj de diversaj homoj por komuna baza dokumentaro (pri urba kaj regiona historio, geografio, lingvo, arkitekturo kaj aliaj artoj, aktualeco kaj ceteraj kulturaj aspektoj) kaj la diversajn ekskursojn. Renée Triolle verkos ĝenerale pri la Norda regiono.

Brian lingve kontrolos la manlibron kaj la aliajn dokumentojn en Esperanto.

La sekva/samtempa paŝo estis, ke la partoprenintoj elektis « sia(j)n » ekskurso(j)n kaj somere/aŭtune pretigos ilin surloke, vizitante la vidindaĵojn, provante la restoraciojn, kalkulante la tempon kaj la kostojn.

Aldone al tiuj postaj eroj de la preparo devus esti plua staĝo iam oktobre-novembre, en la norda regiono.



Trejnado

Pri hommastrumado



Programme d'éducation
et de formation
tout au long de la vie

Dum la seminario Elloke Tutmondan okazinta en Tuluzo, 21/02/2014 / 24/02/2014, en la kadro de Grundtvig-projekto Cyrille Hurstel gvidis trejnadon pri hommastrumado. Jen ekstraktoj el la dokumento pretigita de Veronika Poór kaj Melono, legebla ĉe <http://www.ipernity.com/doc/vinilkosmo/31180087>. Alia parto de la seminario temis pri organizado de spektakloj.



kreskigi ilian produktokapablon
Profitoj por la lernantoj : Pli bone uzi sian tempon por atingi siajn individuajn celojn

Je la fino de la trejnado, lernantoj konas :

- Difinojn rilatajn al mastrumado kaj gvidado per celfiksado,
- Kelkajn ilojn por projektmastrumado,
- Du ilojn por pritrakti konfliktojn je

individua nivelo kaj je grupa nivelo.

Je la fino de la trejnado, lernantoj konscias :

- pri taskoplanado kaj hazardo,
- pri tempoplanado por atingi siajn celojn kaj la celojn de la grupo,
- pri danĝeroj de

modernaj komunikeblecoj rilataj al produktokapabloj,

- pri la funkcio de projekttesto kaj gvidanto,
- pri bremsoj kontraŭ ŝanĝiĝo.

Je la fino de la trejnado, lernantoj kapablas :

- vortumi kaj klarigi projekton al partoprenantoj,
- protekti projekton kontraŭ malfruo,
- solvi konflikton inter 2 personoj,
- plani por venki bremsojn kontraŭ ŝanĝiĝo,
- redukti kaj mastrumi streĉon antaŭ emociplena evento (Publika prezento, arta programero, streĉa kunveno)

Kelkaj atentigoj

Mastrumado de homoj
Gravas konscii, ke hommastrumado estas: uzi homojn, kiujn vi havas, kiaj ili estas (kaj ne kiaj vi ŝatus ke ili estu) por atingi celojn kiujn vi volas atingi aŭ kion vi devas atingi.

Por efike komuniki :

- Homoj kutime memoras ĝis 3 aferojn, do se vi volas, ke iu memoru kion vi diras, diru maksimume 3 aferojn.
- Taŭga mesaĝo estas: mallonga, neatendita, konkreta, kredebla, emocia rakonto. Se via mesaĝo plenumas la suprajn kriteriojn, homoj memoros ĝin.

Mensaj bariloj

La produktadon kaj sukceson ofte malhelpas mensaj bariloj, ekzemple:

- kelkfoje labori malpli estas atingi pli, sed tion oni ne akceptas pro nia mensa barilo, ĉar nia logiko diras, ke ju pli oni laboras, des pli oni sukcesas, sed ne estas ĉiam tiel !
- kelkfoje tiuj povas provizi solvon, pri kiuj oni ne pensus ke ili havas rilaton al la afero;



- la tempo ŝanĝas la problemojn, solvojn... Atentu, ke iam la solvoj de hieraŭ povas esti problemoj de hodiaŭ kaj oni devas forĵeti la malnovajn ideojn, solvojn, malgraŭ ke ili iam bone funkciis.

Partneroj: Skota Eo-Asocio, Triesta Eo-Asocio, Bjalistoka Eo-Asocio, Grupo Esperantista Vercellese – Vercelli (Italio), Visagio TEKK «Espero» (Litovio), EUROKKA kaj lokaj esperantistoj el Esperanto-Kultur-centro de Tuluzo kaj de la Mezpirinea Eo-Federacio

Programo

Temo pritraktita : Celorientita mastrumado

Pedagogiaj rimedoj : Kurso, ekzerco

Atingoj : Kompreni nociojn sammaniere, krei celojn

Profitoj por la lernantoj : Scioj uzeblaj por legi aliajn fontojn en la kampo de organizo kaj gvidi asocion aŭ entreprenon

Temo pritraktita : Tempoplanado

Pedagogiaj rimedoj : Kurso, individua ekzerco

Atingoj : Rimarki ne produktivajn tempojn, konsili al kunlaborantoj por



Programme pour l'éducation
et la formation tout au long de la vie

Kongreso de Esperanto-France kaj Rodanalpa Federacio de Esperanto

Nia kongreso en Chambéry



La kongreso de Esperanto-France 2014 okazis en Chambéry en la fino de majo samtempe kiel la kongreso de la Rodanalpa Esperanto-Federacio. Estis tre bone, ke la asocio de Chambéry « Esperanto Vive » kaj la Federacio kun la apogo de Esperanto-France akceptis organizi ĝin kadre de sia propra kongreso. La rezulto estis brila, ne nur ĉar bele brilis la suno, kio ebligis ĝui la ekskursojn kaj foje kunveni ekstere, sed ankaŭ ĉar la programo estis kulture riĉa.

Interkona vespero: lernejoj de Chambéry prezentis teatraĵeton pri « La dento de la Kato ». Temas pri granda roko ĉe monto apud la lago Bourget, tre proksime al Chambéry. Bona enkonduko al la ekskurso ĉirkaŭ la lago Bourget, kie ni havis okazon vidi de pli proksime tiun Katan Denton sur la monto Kato. Mirinda panoramo ekde tiu monto. Poste la buso pluveturigis nin al ĉarma vilaĝo Chanaz. Tie ni vizitis nuksomuelejon, kiu produktas oleon kaj aliajn specialaĵojn el juglandoj kaj aveloj. La tagmanĝo okazis en restoracio apud la kanalo Savière, kie ni gustumis lokan specialaĵon: kolbasojn kuiritajn en blanka vino, kun polento (maizo-kaĉo). Poste ni vizitis la abatejon Hautecombe kaj reveturis laŭ la alia flanko de la lago, kun mallonga halto en Aixles-Bains. Tre agrabla ekskurso, ne tro da kilometroj, ĝusta kvanto da piedirado, bona ĉiĉeronado kaj reveno ĝustatempe por partopreni komitatitan kunsidon.

Piedmigremuloj havis alternativan ekskurson al la lago Aiguebelette. Pluraj ekskursoj okazis en la urbo mem, sed ili koincidis kun gravaj kunsidoj, do mi ne povis partopreni ilin.

Konatiĝi kun la regiono ni povis ankaŭ en la faka prelego de Thierry

Delahaye, botanikisto en la nacia parko La Vanoise : « Savojo, eksterordinara kontribuado al la vivdiverseco de franca flaŭro. »

Estis cetere serio da interesaj prelegoj faritaj de diverslandaj esperantistoj, kiuj instigis al viglaj debatoj. Mireille Grosjean parolis pri « Esperanto, lingvo de paco ». Pri la « Vivo kaj utilo de Akademio de Esperanto » prelegis vicprezidanto de la Akademio

Brian Moon. Michele Gazzola levis la gravan temon : « Lingva justeco, lingva politiko kaj Eŭropo ».

La vesperoj havis interesan programon. Post la interkona vespero, denove infanoj prezentis kontribuon al vespero. Ĉi-foje temis pri lernantoj de la muzik-lernejo de la apuda vilaĝo La Motte-Servolex, kiuj surprizis ĉiujn per sia kantado de la Esperanto-himno; kongresanoj plezure kunkantis. La sabata vespero estis eble la plej surpriza. Ni malkovris elstaran artiston, profesian, kian oni ŝatus pli ofte aŭskulti! Malmultaj homoj aŭdis antaŭe pri aŭstria artisto Attila Schimmer. Li kantis en Esperanto, ankaŭ en la hungara kaj la franca kaj ankaŭ rakontis diversajn

anekdotojn. Jen artisto, kiu scias okupi la scenejon kaj kapti la atenton de la publiko ! Mirinde !

Kion ni ankaŭ memoru el la kongreso ? Memorinda estas la aŭkcio verve gvidata de Jean-Louis Gayet, kiu sukcesis profite al Esperanto en Afriko gajni eĉ pli ol la necesan sumon por partopreno de unu afrikano en la afrika kongreso. Aldone al jam menciitaj eroj la lokaj esperantistoj bone prizorgis diversajn « detalojn »: bele faritan kulture libron kun la kongresa programo, bonan lokan vinon kun esperantlingvaj etiketoj kaj entute tre agrablan akceptadon de la 125-homa partoprenantaro. Dankegon al la tuta skipo !

Ah, mi preskaŭ forgesas, ke ni havis plurajn statutajn kunsidojn.

La komitato de UFE unuanime elektis novan estraron, tamen ne tute novan.



- Axel Rousseau, prezidanto
- Xavier Dewidehem, vic-prezidanto pri la universala kongreso (Lille2015)
- Didier Loison, vic-prezidanto pri eksteraj rilatoj, informado kaj komunikado
- Aleks Kadar, ĝenerala sekretario
- Raymonde Coquisart, vic-sekretario
- Anne-Émilie Ravache, kasisto
- Sébastien Montagne, vic-kasisto
- Sylvain Barrier, estrarano (nova, zorgos pri Esperanto-Aktiv')

Escepta okazo, ke kunestis en la kongreso 6 prezidantoj kaj la nuna prezidanto de UFE, inkluzive de D-ro Albault, kiun ni havis la plezuron revidi en plena aktiveco.

Alternatiba atendas vin !

Alvoko al multobligado de la alimondismaj vilaĝoj

Stéphane Hessel asertis, ke unu el la kernaj defioj de nia epoko estas "la klimata ŝanĝiĝo kaj la difektadoj pro homaj faroj dum la tri lastaj jarcentoj. La perturbado de la klimato pliakriĝas kaj plirapidiĝas, kio igas la plej malriĉajn loĝantarojn barakti kaj mezperspektive minacas la kondiĉojn de civiliza vivo sur la Tero.

Ĉiuj alarmsignaloj ruĝe lumas. La perturboj de la klimato multobligas kaj aparte trafas la plej malriĉajn loĝantarojn de la Sudo, sed ankaŭ tiujn de la Nordo : senpluvecoj, dezertiĝado, sezonŝanĝiĝoj, inundoj, tropikaj ciklonoj, arbaraj fajregoj, fandiĝado de glaĉeroj kaj glacikampoj... Ĉu ni restadu sen ion fari? Ĉu ni spektadu la planedon bruli?

La defio estas klara: draste malpliigi la ellasadon de forcej-efikaj gasoj por ne transpasi la danĝerajn eĉ ne retrotranspaŝeblajn limojn de la klimata plivarmiĝo kaj malstabiligi.

La masiva, abrupta perturbo de la klimatsistemo en tiel mallonga tempoperiodo de la klimatsistemo estas senprecedenca defio en la homara



historio.

Sed Alternatiba, tiu mirinda tago, igu nin konservi esperon : la solvoj ekzistas, ili jam estas aplikataj de miloj da asocioj, da lokaj komunumoj, da individuoj. Pli bone: tiuj alternativoj konstruas socion pli vivagrablan, pli bonetosan, pli solidaran, pli justan kaj pli humanan.

Kampula agrikulturo, reproksimigo de la ekonomio, defi-kongrua aranĝado de la teritorio kaj la disvolvado de opcioj aliaj ol ĉiea ŝose-konstruado, energia modero, ekologia loĝmaniero, obeigo

de la financo, sociala kaj ekologia transformado de la produktiva sektoro, respondeca konsumado, pli bona divido de la laboro kaj de la riĉeco, interhelpo, malpliigo kaj recikligo de rubaĵoj, protektado de la komunaj havaĵoj tiaj kiaj akvo, kamparo aŭ arbaroj : ĉio ĉi montras al ni la vojon... La batalo kontraŭ la klimatsanĝiĝo ne limigas perspektivojn sed estas plej bona impeto por konstrui pli humanan estontecon.

Bedaŭrinde, la registaroj, la potenculoj de ĉi tiu mondo sekvas alian vojon. La internaciaj traktadoj pri la klimato vagas kaj misvojas. La plurnaciaj entreprenoj kaj la ekonomiaj premgrupoj faras ĉion, por ke tiuj alternativoj ne estu aplikataj, ĉar ili minacas iliajn profitojn kaj povon.

Eĉ pli fie, ili trudas siajn falsajn solvojn, senefikajn kaj danĝerajn: atomenergion, agrobrolaĵojn, GMO-ojn, kompensmeĥanismojn, surmerkatingon de la naturo, klimatingenieradon, ktp. Tiuj ebligas la plutenadon de modelo en kiu la Nordo kaj la plej riĉaj loĝantaroj de la planedo forrabas la naturon, akaparas la riĉecon kaj detruas la medion, notinde en la Sudo.

La civitana engaĝiĝo, la mobilizado de la loĝantaroj kaj la realproprigo de nia estonto estas nepraj por kontraŭpezi tiun sabotadon. La engaĝiĝo de ĉiu el ni, kion Stefan' Esel' tiel laŭte alvokis, estas nuntempe prioritato por respondi la klimatan defion.

Stabiligo de la klimato estos rezulto de nia unuiĝo, de nia kolektiva inteligento, de nia solidareco kaj de nia soifado je



sociala justo, de nia kapablo ekigi la ŝanĝojn tie kaj tuj, komenci la transiron, sen plua atendo.

Fine de 2015 okazos COP21, la 21-a konferenco de UNO pri klimatsanĝiĝo. Ses jarojn post la tre amasinformile diskonigita konferenco de Kopenhago, COP21 devus esti same multe prilumata, ĉar la ŝtatestroj publike engaĝiĝis por tie alpreni novan internacian interkonsenton pri luktado kontraŭ la klimatsanĝiĝo post 2020. La horizonto de 2020 estas indikita de la sciencista komunumo tutmonda kiel limo ĝis kiam nia ellasado de forcej-efikaj gasoj





● ● ● estu komencinta signife malkreski se ni volas eviti plejan malbonon.

Por ke tiuj promesoj ne restu sensekvaj kiel okazis post Kopenhago, endas ke gecivitanoj, popolanoj mem engaĝiĝu kaj agadu por starigi verajn solvojn. Des pli ke tiu COP21 okazos en... Parizo, en la flughaveno de Burĝeto (Le Bourget)!

La popola mobilizado en Francujo kaj Eŭropo pri temoj kiel klimata urĝo kaj sociala justo reiĝas do celoj kun aparta aktualeco.

La sukceso kaj hom-kuniga kapablo de Alternatiba, tiu ĉi vilaĝo de alternativoj starigita dank' al la engaĝiĝo de ĉiu el ni

ĉi tie en Bajono (Bayonne), montras al ni unu el la vizaĝoj, kiujn povus alpreni tiu eŭropa civitana mobiliziĝo.

Ni alvokas ĉiujn urbojn kaj ĉiujn Eŭropajn teritoriojn prepari siavice kaj ekde nun siajn proprajn Vilaĝojn de alternativoj pri klimatsanĝiĝo kaj pri sociala kaj ekologia krizo.

Temos tiom pri atentigi la regantojn pri dramaj konsekvencoj de manko de internacia akordo ambicia, efika, deviga kaj justa pri klimato, kiom pri alvoki loĝantarojn ekigi sen plia atendo socialan, energian kaj ekologian transiron necesan por eviti profundan kaj neinvertigeblan misreguligon de la

klimataj meĥanismoj.

La celo ankaŭ estos unuigi ĉiujn, kiuj iamaniere, per la alternativoj aŭ la bataloj kiujn ili kondukas, kontribuas, foje scencie, al protektado de la klimato. Kion faris Alternatiba en Bajono, tion ni povos reprodukti ĉie, laŭ la plej diversaj formoj.

Ankaŭ Esperanto havas sian lokon en tia agado, por antaŭenigi ideojn pri lingva demokrateco kaj justeco.

Por vidi ekfloradon de dek, cent, mil Alternativoboj, ni kune disvastigu ĉi tiun Alvokon ĉirkaŭ ni. Arigu ni maksimumon da agantoj de la ŝanĝiĝo por ekde nun prepari la Vilaĝojn de novfarajoj, kiuj disfluu ĉie en Francujo kaj Eŭropo, ĝis la Pariza COP21.

Unuiĝintaj kaj firme decidaj, ni povas venki ĉi tiun batalon en la Nordo samkiel en la Sudo. Por ni kaj la sekvaj generacioj. Por ke eblu diri, hodiaŭ tiel kiel morgaŭ: "ni engaĝiĝis kiam ankoraŭ tempo estis!". Ĉu ankaŭ via klubo partoprenos en la loka Alternatiba ?

B.F. kaj
www.alternatiba.eu



Prelegvojaĝo en Francio

Sinteza raporto pri la turneo 2014 de Mikaelo Lineckij el Ukrainio

De la 9a ĝis la 19a de majo, Mikaelo Lineckij prelegvojaĝis en Francio. Elisabeth Barbay akceptis lin en Parizo kaj, kun SAT-Amikaro, organizis debaton pri la intermilitaj eventoj. Ĉeestis la kunvenon 11 homoj. Ankaŭ en la aliaj urboj, la temo pritraktita estis en rekta rilato kun la nunaj ukrainaj eventoj, kvankam Mikaelo preparis tre diversajn prelegojn pri historio kaj kulturo de sia lando, ankaŭ pri diversaj aspektoj de la lingvo Esperanto. Sed la publikoj volis pliajn informojn pri la situacio, despli ke Mikaelo loĝas en Kiev kaj proponis proprajn fotojn, notinde pri la nun tutmonde fama Placo Majdan.

En Bourges, « tre agrabla restado », 15 homoj (inter ili 7 ne-esperantistoj) aŭskultis la preleganton. Venis ĵurnalisto

sed neniu raporto aperis en loka gazeto. En Châteauroux, 20 homoj (4 ne-esperantistoj) faris « multajn demandojn kiujn volonte respondis la preleganto ». Aperis artikolo en « L'écho » kaj « La Nouvelle République ». Mikaelo ankaŭ sukcese

prezentis sian KDon pri esperantaj ludoj por komencantoj kaj progresantoj. Aperis artikolo en « La Montagne », post prelego en Mozac (11 homoj) kaj Clermont-Ferrand (13 homoj) sed « restis ne sufiĉe da tempo por turismi ».

Lasta etapo okazis en Hérouville kaj apuda vilaĝo Colleville-Montgomery kie prelegis Mikaelo. Entute, 35 homoj (10



ne-esperantistoj) kaj artikolo en Ouest-France.

Mikaelo pritraktis kun konvinko malfacilan temon... kelkfoje forgesante, ke „por interpretisto la frazoj ne devas esti tro longaj“ (Ĵak).

Ni povas bedaŭri, ke oni malofte petis de li unu el la aliaj temoj kiujn li preparis, ankaŭ ke ni povis organizi nur 10-tagan turneon pro balotado en Ukrainio la 25an de majo.

Yves Nicolas

Sciencoj

Arkivo de Sciencia Revuo 1949-2013 legebla en la reto !

La «Sciencia Revuo» estas eldonata de Internacia Sciencia Asocio Esperantista, ISAE. La revuo aperas ekde 1949 kaj estas daŭriganto de Internacia Sciencia Revuo fondita en 1904. ISAE nun malfermis publikan interretan arkivon de Sciencia Revuo de la postmilita periodo, kio signifas, ke en la retejo <http://sciencia-revuo.info> estas legeblaj en skanita formato pli ol 2000 artikoloj, aperintaj inter 1949-2014 en Sciencia Revuo.

La artikoloj estas skanitaj en simpla, sen-taksta bilda formato, sed la retejo donas eblon pri serĉado laŭ nomo de la aŭtoro kaj titolo de la artikoloj.

Motoroj de la projekto estis Johannes Mueller (DE) kaj Mélanie Maradan (CH). La skanado de la artikoloj realiĝis danke al la kunlaboro kun Interkultura Centro Herzberg.

Adreso de la arkivo: <https://sciencia-revuo.info/issue/archive>

Info : Ret-Info / Lingvo-Studio, LS



Literaturo

Kristnaskaj rakontoj el franca Kanado de Louis Fréchette (1839-1908)

Ses ĉarmaj kristnaskaj rakontoj – anglalingva eldono 1899 – franca eldono 1900 – unua esperanta eldono (tradukis Vincent Beaupré) 1972 – dua esperanta eldono (tradukis Vincent Beaupré kaj Francisko Lorrain) 2013 de Esperanto-Societo Kebekia. 130 paĝoj, el kiuj 94 por la rakontoj mem, la ilustraĵoj de Frederick Simpson Coburn kaj mapoj por loki la rakontojn – abundaj notoj -antaŭparoloj – prononcindikoj por la ne-esperantaj vortoj en la teksto – indekso de esperantaj geografiaj nomoj. Aĉetebla ĉe UFE, (16,20 €).

Estas bela ideo traduki en Esperanton verkojn kiuj sciigas pri iu regiono. Persone sen tiaj tradukoj mi verŝajne neniam estus leginta ekzemple pri frisa kulturo. Tiu libreto pri niaj « gekuzoj » estas do bonvena.


Por kontroli la aserton, ke L. Fréchette estis « unu el la gravaj franckanadaj verkistoj de la 19a jarcento » (kovrilo) mi tralegis listojn de kanadaj franclingvaj verkistoj en kiuj li ĝenerale aperis kaj komparis kun la iom simila Henri Pourrat

(1887-1959), 26 linioj en Grand Larousse Encyclopédique por Fréchette, 20 por Pourrat, rezultoj en Google 535.000 por la kanada aŭtoro, 304.000 por la aŭvernia.

Iam tre impresis min legi pri la lupoj kaj teruraj neĝoŝtormoj en la regiono en kiu mi vivas sed mi ne povis imagi ke homoj transirante frostiĝintan riveregon povas fronti moviĝantan muron de glacio. La rakontoj de Fréchette ankaŭ povas esti amuzaj eĉ se temas pri urso.

Mi ne bedaŭras la legadon kaj invitas vin legi la verkojn de tiu multtalenta politikisto (kiu proponis ke lia lando estu respubliko) kaj verkisto ne nur de rakontoj sed ankaŭ de teatraĵoj kaj poezio.

Jean-Pierre Boulet



Kaj jen mi ! Libertempo en 1996

Extrait de *Kaj jen mi!* autobiographie écrite en réaction, ou plus exactement, en complément à celle de son mari, Gerrit Berveling. Gerrit Berveling est pasteur de la Fraternité remonstrante, mouvement protestant très libéral. Il a enseigné le latin et le grec et a traduit en espéranto une anthologie latine, actuellement en 6 volumes. 6 autres volumes sont prévus.

Madzy van der Kooij estas la edzino de Gerrit Berveling, remonstranta pastoro (la remonstranta Eklezio estas speciala al Nederlando kaj tre liberala) kiu instruis la grekan kaj la latinan lingvojn plie estas elstara tradukisto de la Antologio Latina, nuntempe sesvoluma, sed li daŭrigas la laboron kaj antaŭvidas 12 volumojn.

Poste ni spertis tre specialan ferion. La vojaĝo kun la pastoroj al Turkio rezultis en ion bonan : Gerrit ankaŭ anoncis sin kiel vojaĝgvidanto por vojaĝo al Italio ; li ja relative bone parolas la Italian. Ni renkontis la paron, kiu antaŭ ni gvidis tiun vojaĝon kaj iris ĝojplene al la aventuro. Jam tuj montriĝis, ke ni estas komencantoj tiurilate : ni forgesis simplajn aferojn, kiel ŝnuron kaj glubendon. La ŝoforo malafable diris, ke ni estis komencantoj - prave, kompreneble, sed la maniero por diri tion malplaĉis al ni. Fakte ekde tiam la interrilato kun li estis ne tre bona. Bedaŭrinde, ĉar fakte oni devas daŭre bone kunlabori. Alproksimiĝante Romon, montriĝis, ke li atendis de ni ke ni sciu la vojon al la hotelo en Romo kaj ke ni kunportis mapojn. La organizaĵo, «Drietour», tute ne avertis nin pri tio kaj, estante ja komencantoj, ni fakte ne sufiĉe bone antaŭpripensis tiajn aferojn.

Do, iom da kverelado... Feliĉe Gerrit konas relative bone la vojon en Romo - kvankam tio neniam estis tre forta flanko lia, ekkoni la vojon - do sen tro da problemoj ni ja trovis la hotelon. Miraklo, ĉar ĝi situis je la transa flanko de Tibero, kvartalo, kiun ni ambaŭ ne bone konis. Ni vizitis tie la plej famajn vidindaĵojn, kiel la muzeojn de Vatikano, la Sanktan Petron, la Roman forumon. Nia ĉiĉeronino estis Nederlاندanino, do bone. Estas malpermesite mem ĉiĉeroni en Italio, kvankam certe en Romo mem, Gerrit tre bone povus.

Sed oni protektas la diplomitajn gvidist(in)ojn, kio ja ankaŭ estas defendebla. En Romo ni ankaŭ vizitis la Preĝejon de la Frisoj, do la Nederlanda Romkatolika preĝejo ĉe Vatikano. La diservo estis Nederlandlingva kaj kafo poste ! La ŝoforo iomete grumblis, ke li devis veturi. Drietour nome estas kristana vojaĝorganizaĵo. Vespere devas okazi tagfermo de la tago kaj dimanĉo estas tago por ripozi - sed por viziti diservon oni akceptas escepton.

Madzy van der Kooij



TEMPS LIBRE EN 1996

Nous avons eu des vacances un peu spéciales. Gerrit s'était proposé comme guide pour un voyage en Italie; de fait, il parle relativement bien l'italien. Nous avons rencontré le couple de guides du voyage précédent et nous sommes lancés tout joyeux dans l'aventure. Dès le début il se révéla que nous étions novices en la matière: nous avons oublié des choses toutes simples comme de la ficelle et du ruban adhésif. Le chauffeur nous fit remarquer de façon désagréable que nous étions novices – pure vérité assurément - mais le ton nous a déplu. Et de fait à partir de ce moment-là nos relations avec lui ne furent pas très bonnes. C'était bien dommage, car vraiment c'est tout le temps que l'on doit collaborer harmonieusement. A l'approche de Rome, il s'avéra qu'il attendait de nous que nous connaissions l'itinéraire pour aller à l'hôtel et que nous ayons apporté un plan. L'organisme «Drietour» ne nous en avait pas du tout avertis et, en vrais débutants que nous étions, nous n'avions, je le reconnais, pas bien anticipé ce genre de problème. Il s'en suivit donc un échange de propos peu aimables... Heureusement Gerrit sait relativement bien comment s'orienter à Rome, quoique les itinéraires n'aient jamais été son fort. Nous avons donc trouvé l'hôtel sans trop de problèmes. Un vrai miracle, car il se trouvait sur l'autre rive du Tibre, quartier qu'aucun de nous deux ne connaissait bien. De là nous avons visité les plus beaux monuments, comme le musée du Vatican, la basilique Saint-Pierre, le Forum. Notre guide était néerlandaise, ça allait. Il n'est pas permis de faire le guide en Italie, même si à coup sûr, à Rome même, Gerrit aurait très bien pu le faire. Mais on protège les guides diplômés, ce qui peut se comprendre aussi. A Rome nous avons encore visité l'église des Frisons, donc l'église néerlandaise catholique romaine près du Vatican. L'office était en néerlandais; ensuite: pause-café! Le chauffeur grogna bien un peu de devoir reprendre le volant. Effectivement Drietour est un organisme spécialisé dans les voyages chrétiens. Le soir il y a au programme un petit bilan de la journée et le dimanche est le jour de repos – mais pour assister à l'office on peut faire une exception.

Madzy van der Kooij, traduction de Anne Jausions

Tooni post la cunamo

Mia grupo helpas 104 lernantojn en la urbeto Tooni en la gubernio Iŭate. Tiun fiŝkaptistan urbeton multe damaĝis la cunamo de 2011. 19 homoj mortis kaj multaj perdis laboron. La lernejestro de la lernejo Tooni regule eldonas Informilon de la lernejo. Mi tradukis ĝin en Esperanton. Jen resume kelkaj el la eventoj dum la nuna jaro.

HORI Jasuo

La unua trajno post la Katastrofo

La 5an de aprilo la unua trajno post la Katastrofo venis al la stacio Tooni.

En la kurskomenca ceremonio la lernejestro diris al la lernantoj: “Trajnlinio Sanriku reviviĝis, ĉar troviĝis homoj, kiuj forte deziris tion”. En tiu memorinda evento ni povis partopreni. Ĝi estas bonega memorigo kaj samtempe tre bona inspiro por tiu ĉi nova jaro. Ni startis sukcese. Same kiel en vigla Sooran-danco la lernantoj antaŭeniros per konstantaj paŝoj.

Fama aktorino Fuĵiŭara Norika, kiu subtenas suferantojn, venis al la ceremonio. Uemura Kaito (la estro de la asembleo de la lernantoj de Tooni):

En la evento por festi la reviviĝon de la trajnlinio Sanriku, ni, lernantoj de la elementa lernejo Tooni, dancis la Sooran-dancon. Antaŭ alveno de la trajno, mi estis streĉita, sed kiam mi vidis la trajnon proksimiĝi, en mia koro naskiĝis granda dankemo. Mi volas baldaŭ vojaĝi per ĝi. La trajno kuraĝigas la vilaĝon. Ankaŭ ni kuraĝigas ĝin per varmaj salutoj.

Akcepto de novaj lernantoj

La ceremonio por akcepti novajn lernantojn okazis la 9-an de aprilo. Estis vere varma printempa tago. Kvin novaj lernantoj venis en la ceremoniejon kun la mienoj streĉitaj, gvidate de

s-ino Konno Akiko, ilia instruistino. Alvokitaj, ili respondis per klara voĉo kaj salutis gastojn, instruistojn, lernantojn kaj gepatrojn. En la ceremonio partoprenis iliaj gepatroj kaj 20 gastoj. La elementa lernejo Tooni en 2014 havas 58 lernantojn. Kun la slogano « Tooni neniam malvenku! » ni, instruistoj, kuraĝigos la lernantojn defii diversajn aferojn kun forta spirito kaj kreskigi siajn bonkvalitojn ankaŭ en la kvara jaro post la katastrofo.

Kurskomenca ceremonio la 26an de aprilo 2014



Antaŭ kaj post la kurskomenca ceremonio pliaĝaj lernantoj helpis reordigi la ceremoniejon. Ili ekhavis konscion respondeci pri la lernejo. En la tago de la kurskomenca ceremonio ĉiuj 58 lernantoj vizitis la lernejon kaj same en la dua kaj la tria tagoj. Bonega starto! « Malmultaj forestantoj », tio estas unu el la meritoj de nia lernejo. Ni devas danki



●●● ankaŭ al la gepatroj.

Dum la jaro lundo estas la tago, kiam multaj lernantoj forestas. Certe troviĝas diversaj kialoj, sed precipe la lernantoj en la unua kaj la dua lernojaroj estas lacaj en lundo pro malfrua enlitiĝo en sabato kaj dimanĉo. Ili enlitiĝu frue ankaŭ en tiuj tagoj.

Estas bonege, ke ĉiuj komencas la tagon per saluto “Bonan matenon!”. Ili jam havas bonan kutimon pri salutado, sed ĉu ili salutas sammaniere ekster la lernejo? Ekzemple, dum la ceremonio okaze de la unua trajno de Sanriku en la stacidomo Tooni, ili malofte salutis aliajn homoj.

Ekskursoj

Vidante lignan strigon skulptitan per ĉensegilo, la lernantoj kriis: “Mirinda arto!” kaj manĝante lunĉon, ili kriis: “Bongusta!” Temas pri lernantoj dum dutaga trejnado. Ili estas tre sentemaj. Ĉis kiam ili plu havos tiun belan senton?

Infanoj de la unua kaj la dua lernojaroj iris al la monto Nacumuŝi en la urbo Sanriku. Infanoj de la tria kaj la kvara lernojaroj iris al la vilaĝo Furusato en la urbo Toono. La ekskurso al Nacumuŝi-jama okazis la 28an de majo, prokraste je unu tago pro pluva vetero kaj la ekskurso al la Furusato-vilaĝo okazis laŭplane la 27an de majo.



En Nacumuŝi-jama la lernantoj povis kontente ludi per diversaj ludiloj en bonega vetero. En la vilaĝo Furusato la lernantoj spertis kulturon de la urbo kaj aŭskultis folklorajn rakontojn en la urbo. Okaze de la komenciĝo de la ekskursoj f-ino Janai Mai, reprezentante la ekskursantojn, salutis ilin, dirante, ke ili havos ĝojan ekskurson, sekvante regulojn. Ankaŭ en la trajno la lernantoj havis ĝojan tempon. Dank’ al tiuj ekskursoj, amika etoso de la samklasanoj plifortiĝis.

Suferinta piano ludis melodion de reviviĝo

Horizontala piano uzita en la eksa elementa lernejo Tooni estis multe

damaĝita de la cunamo kaj lasita en la detruita lernejo pli ol unu jaron. Poste piano-riparisto el la urbo Iŝinomaki de la gubernio Mijagi komencis ripari ĝin kaj la 2an de junio tiu piano revenis. Gepianistoj de la klubo de la Universitato Toohoku ludis en la eksa sportejo de nia lernejo.

Plantado de batatoj kaj lernado pri nutraĵo

La lernantoj de la unua kaj dua lernojaroj plantis batatidojn sur kampo de s-ro Seki. Ili rikoltos bongustajn batatojn en aŭtuno. La lernantoj de la 3a kaj 4a lernojaroj lernis pri nutraĵoj sub la gvido de dietistino. Ili lernis pri rolo de karbonhidrato, proteino kaj vitaminoj kaj pri tio, kiuj manĝaĵoj enhavas tiujn elementojn.

La gelernantoj stiris patrolŝipon !

La 19an de junio ĉiuj gelernantoj vizitis filion de la buroo de mara sekuro en la urbo Kamaiŝi. Post la katastrofo ili ne havis okazon ludi sur plaĝo kaj kolekti konkajaĵojn, kvankam ili loĝas apud la maro. Ni opinias, ke ili sciu pli multe pri maro, do ni proponis al la filio, ke ili vizitu ĝin kaj lernu pri maro. Dum la vizito la lernantoj lernis kiel nodi ŝnurojn, surmetis uniformon de oficisto kaj skafandron, ĝuis kvizon pri laboro de la buroo kaj fine eĉ stiris patrolŝipon Kijikaze.

